

# ESPERANTO KAJ NATURISMO



EEDC - Szikósfürdő Nudist Beach & Camping (II)

Viziti alilandajn naturistajn plaĝojn, eble pli sunriĉajn, foje pli romantikajn ol la hejme jam konatajn, estas ĉiama deziro de naturisto. Ĝui nude la plezurojn de fremdaj akvobordoj, eĉ agrablan boatadon en pitoreskaj golfetoj aŭ riveroj, prezentas ofte al ni neforgeseblajn travivaĵojn. Eble pro tio, ĉar en tiaj lokoj ni sentas pli intiman rilaton al la naturmedio ol hejme, kaj la sopirata refreŝiĝo aparte forte efikas nian personecon.

Do ni volonte ekvojaĝas por renkonti aliulojn, prefere el aliaj nacioj por akiri pli vastajn konatulojn kaj konojn pri la mondo – ja, ni estas esperantistoj! Nin altiris tiu internacie orientiĝanta movado, ni sukcese lernis ties facilan lingvon ĝuste por interparoli kun la mondo. Pri nudaj homoj ne laŭ la vestaĵoj, sed helpe de vortoj eblas ekscii interesaĵojn, ankaŭ informiĝi pri iliaj inklinoj, kutimoj, deziroj kaj – travivaĵoj naturistaj!

Ĉirkaŭ nia – eble eta – kompanio rigardu la “enviemajn” aliulojn, kiuj ne kapablas interkompreniĝi / aŭ nur kelkvorte, foje balbute, kaj per gestoj /, almenaŭ ne kiel ni povas: senĝene, trankvile – ĉar internacilingve – tion fari en plurnacia, gaja kunesto. Ho, jam kiom multfoje mi mem rimarkis la interesigeman, scivolan rigardon de aliaj naturistoj, ĉu familioj, ĉu geamikoj, kiam ili devis senti *sian lingvan izolon*, manke de sufiĉa, taŭga lingvokono. Tiu malebligis al ili konvenan kontakton kun alia naturista, sed fremdlingva familio. / Verŝajne ankaŭ vi ricevis jam demandojn sur la plaĝo: kiulingve vi kontaktis kun tiuj “alilandanoj”?/

**La simpla respondo:** “Ni interparolis en lingvo Esperanto” estas akceptata ĉe iuj kun eta surprizo, ĉe aliuloj kun la konvinko, ke temas pri nenia novaĵo por ili, ĉar havis jam tian sperton ankaŭ aliffoje. Memkompreneble! Ĉar en naturistaj plaĝoj kaj terenoj, kie troveblas abunde diverslandanoj, vere ne estas malofta fenomeno aŭdi Esperantan parolon. *Bonvolu provi* tion per la tre utila maniero: kiam vi alparolos fremdlingvaj naturistojn, demandante plej unue pri la lingvo utiligebla / se vi ne parolas ilian lingvon / por la konversacio, diru al ili nian ŝlosildemandon: ĈU VI PAROLAS ESPERANTON? Mi ofte spertis, ke eĉ la nea respondo enhavis mension pri iama Esperanto-kurso, pri kono de kelkaj, iam lernitaj frazetoj en nia lingvo! Superflue diri, ke se eventuale ni povos daŭrigi la konversacion en alia lingvo / kvankam bal-

butante ambaŭflanke /, ni utile povas atentigi ilin al la pli praktikaj ebloj, kion prezentus, se ni povus daŭrigi – kaj eble ni povos! – la interparolon en la bedaŭrinde “forgesita” Esperanto.

Jen montriĝas do bonega paroltemo, la lingvaj malfacilaĵoj inter amikiĝantaj personoj... kaj nun la estimata leganto certe ne bezonas konsilon, kiel turni la diskuton al nia facila Esperanto. Tamen, permesu, ke mi rekomendu al vi: montru al la novaj geamikoj naturistoj *Esperanto-revuon*, kiun vi kunportis por feria legado. Kaj kio estus pli natura al naturisto-samideano, ol tio, ke vi montras ekzempleron de NATURISTA VIVO, tiun modestan, sed ilustritan revuon de INOE – Internacia Naturista Organizo Esperantista.

Tiel vi praktike prezentas la internaciecon de naturistoj, kies interkonatiĝon kaj kontaktojn favore helpas la Internacia Lingvo. Kaj aparte la organizaĵo INOE kaj ĝia presorgano, “Naturista Vivo”, kiun oni legas en 40 landoj. Tiu vasteco de INOE bone ebligas propagandi tra la mondo la naturistajn ideojn, krome organizi / memstare aŭ kun aliaj naturistaj organizaĵoj / internaciajn naturistajn kunvenojn, renkontojn, tendarojn en belaj lokoj de diversaj vizitindaj landoj.

Estas ja tute ne mirinde, ke tiom multaj esperantistoj troveblas inter naturistoj – kvankam eblas aserti ankaŭ inverse, ke inter la multaj esperantistoj oni trovas surprize multajn, kiuj kultivas la naturistan vivoformon. Mi ripetas: tio estas vere ne mirinda afero, ĉar kio estas pli agrabla dum naturista ferio, ol sen lingvaj obstakloj interparoli kiel amikoj, kvankam venintaj el malsamaj landoj. Guante plezure la vivon sen vestoj, sen ĝena “fremdeco”, kiun tiom ofte kaŭzas, eĉ en tutnuda societo, la ne komprenataj paroloj de la buŝoj – ne nur la brile ridantaj okuloj “parolu”! Tiun naturistan revon solvas feliĉe nia Esperanto.

*Helpu ankaŭ vi – aliĝante* al nia naturista organizaĵo, INOE / faca asocio de Universale Esperanto-Asocio, UEA /. Adreso de la sekretario/kasisto: s-ro Ferdinand Simon, B.P. 30 BXL 22, B-1000 Bruselo, Belgio.

*Ervin Fenyvesi*, Budapest  
(redaktoro de *Naturista Vivo*)